Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-55 en Panevėžys, Litovio


# Abelo

Vendredo, la 12-a de julio 2019

*N-ro 7*



## La unua lernolibro en Baltio


Starptautiſka waloda
„La lingvo internacia"
no
Dr. Esperanto.
Preekschwahrdi, gramatika, gabalini lasiſchanai, starptautiſka-latwiſka un latwiſka-starptautiſka wahrdnize.
Sastahdijis
R. Libeks.
Rigâ, 1889.
E. J. Sichmana apgahdeenâ.

La jaron 2019 oni povas konsideri jubilea jaro pro la 160-jariĝo de L. L. Zamenhof, 100-jara jubileo de Litova Esperanto-Asocio, la 60-jara jubileo de BET kaj multaj aliaj rondaj datrevenoj en nia vasta Esperantujo.

Tamen por partoprenantoj de BET-55 estus grave scii, ke antaŭ 130 jaroj komenciĝis Esperanto-movado sur la teritorio de Baltio. En 1889 en Rigo estis eldonita la unua Esperanto-lernolibro por latvoj. Ĝia aŭtoro estis instruisto Rūdolfs Libeks (1854-1908). Ĝi estas la unua lernolibro presita ekster Varsovio, la deka Esperanto-lernolibro laŭvice kaj ĝi estas notita en la listo de la unuaj Esperanto-libroj kiel la 29-a.



Rūdolfs Libeks lernis Esperanton tre frue post ĝia apero. Jam ekde junio de 1888 en la gazeto "Baltlanda Heroldo" aperis liaj anoncoj pri Esperanto-kursoj. Povas esti, ke tiuj estis inter la unuaj Esperanto-kursoj en la mondo: "Oni devas rapide ekposedi tiun ĉi lingvon ne nur tial, ke ĝi povas doni multe da bono por la homaro, sed ankaŭ tial, ke ĉiu per malgrandaj penoj baldaŭ povas atingi grandan sukceson. ...Dum du monatoj eblas ellerni ĝin...

La lernolibro por latvoj konsistis el: latvalingva enkonduko; alfabeto, gramatiko kaj rakontoj por legado: popoleldiroj, sentencoj de Leopold Einstein, ekzemploj por leteroj kaj telegramoj, latvaj popolkantoj, historia legendo "La monto "Dom" apud Dorpat", poeziaĵoj "El Heine", "Kanto de studentoj" de Hemza, kvarlinia verso "Patrino: jen venis koksisto al ni!" en 12 lingvoj (laŭ

## Programo

### La 13-an de julio (sabato)

| | |
|---|---|
| **7.00–8.00:** | Matenmanĝo – la unua alterno. |
| **8.00–9.00:** | Matenmanĝo – la dua alterno. |
| **10.00–11.00** | Prelego de d-ro Gábor Márkus "Stelo super la Han-rivero" (ĉambro 117). |
| **10.00–11.00** | Prelego de d-ro Orlando Raola "Energio kaj klimato cele al daŭripova evoluo" (ĉambro 118). |
| **10.00–11.00** | Prelego de prof. Gong Xiaofeng "Koncize pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio" (ĉambro 124). |
| **10.00–12.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (ĉambroj 303-311). |
| **11.00–12.00** | Pupista horo de Anna Striganova (ĉambro 204). |
| **11.00–12.00** | Prelego de Robert Kamiński "Zamenhofaj Esperanto-objektoj" (ĉambro 117). |
| **11.00–12.00** | Prelego de Jean-Claude Roy pri la agado en la urbo de Jules Verne (ĉambro 118) |
| **12.30–13.30** | Tagmanĝo – la unua alterno. |
| **13.30–14.30** | Tagmanĝo – la dua alterno. |
| **15.00–16.00** | Prelego de Alfred Heiligenbrunner "Gravitaj Ondoj" (ĉambro 124). |
| **15.00–16.00** | Prelego de Tatjana Auderskaja "Libera artisto" pri Nikolaj Blaĵkov (ĉambro 204). |
| **15.00–16.00** | Prelego de Marco Teani "Kiel nia civlizo povas fali: kolapsologio por nia generacio" (ĉambro 118). |
| **16.30–17.30** | **Solena fermo de BET-55** (ĉefsalono). |
| **18.00–19.00** | Vespermanĝo – la unua alterno. |
| **19.00–20.00** | Vespermanĝo – la dua alterno. |
| **20.00–21.30** | Adiaŭa vespero kaj koncerto (ĉefsalono). |

germana originalo); kelkaj konsiloj por pli rapida lernado de la lingvo; Esperanto-latva vortaro de Dr. Esperanto kaj Latva- Esperanto vortaro de Libeks kaj “Nomaro de l’ verkoj pri la Lingvo Internacia (Esperanto), kiuj eliris ĝis marto 1889”. La prezo de libro estis 60 kopekoj, ĝi estis eldonita en 1000 ekzempleroj.

En la gazeto “Tagofolio” (15.08.1888.) Libeks skribis: “Lingvo de Dr. Esperanto estas tre granda trovaĵo, ĝi meritas, ke kun ĝi konatiĝu ne nur iu rondeto de edukitaj homoj, sed la tuta mondo. Latvoj ne rajtas ĉe ekkono de ĉi tiu trovaĵo resti la lastaj“.


Historio montris, ke latvoj ne nur ne restis la lastaj, sed male – dank’ al Rūdolfs Libeks estis inter la unuaj.

Post jaro en 1890 aperis lernolibro de Esperanto por litovoj de katolika pastro Adomas Jakštas-Dambrauskas (1860-1938), en 1893 – la unua Esperanto-lernolibro por estonoj de lernejestro Villem Vaher (1873-1944).


Estis proponita prelego por Somera Universitato, bedaŭrinde pro diversaj kialoj ĝi ne okazis. Venu post jaro al Latvio al BET-56 kaj vi ekscios multajn interesajn faktojn pri la komenco de la Esperanto-historio en Baltio.

**Margarita Želve**

# Jean-Claude Roy



Jean-Claude Roy loĝas en la urbo Amiens (Francio), la urbo de Jules Verne. Li ĉefe zorgas pri la loka klubo kaj agas kun la urba magistrato. En 2018 li tradukis libron el la franca, kiu nomiĝas „Tagordo“. Li havas multajn projektojn por Esperanto, kaj ĉefe interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en la francan edukadsistemon. Li ĵus finis la tradukon de la nova libro de la sama aŭtoro Eric Vuillard. Lia devizo estas: „obstine antaŭen!“. Jean-Claude Roy prelegos pri siaj aktivecoj sabate antaŭtagmeze.





La Esperanto-klubo enAmiens, la urbo de Jules Verne

# Mirinda meso



Kvankam multaj merkrede ekskursis, je la 10-a la eleganta flava katedralo merkrede estis kvazaŭ plena. Sekvis sufiĉe klasika katolika meso en Esperanto, celebrita de M. Dyglys (ĉefa temo: la persekuto de 1 sur 7 kristanoj en la mondo). Por mi persone pleje plaĉis la muzika aspekto. Belega orgeno, grupo de inaj kantistinoj kaj la „Ave Maria“ de Gounod interplektiĝis bele kun la ritualaj tekstoj. Normale mi trovas „Ave Maria“ iom tro pompa, sed ĉi tie la violono belege kaj varme subenvenis de la balkono. Bela kaj intima mateno!!! **Anne Tilmont**


**Fotoj: Gražvydas Jurgelevičiusa**

# Manĝmenuo por BET-55

**La 7a tago, sabato** (2019-07-13)

| | | |
|---|---|---|
| **Matenmanĝo** 7:00 – 9:00 | Kaĉo el trispeca grio | 200 g |
| | Fruktoj | 100 g |
| | Kafo, teo | 200 g |
| **Tagmanĝo** 12:30 – 14:30 | Okzala supo | 250 g |
| | Fritita fiŝo | 100 g |
| | Fritita porkaĵo | 120 g |
| | Kuiritaj fagopiroj | 100 g |
| | Salato el freŝ-legomoj | 100 g |
| **Vespermanĝo** 17:30 -19:30 | Terpomaj platkukoj kun kazeo, krema saŭco | 220g / 40 g |
| | Gistaj flanoj kun konfitaĵo | 200 g / 40 g |
| | Teo | 200 g |

# Tuttaga ekskurso

Partoprenantoj de la merkreda tuttaga ekskurso ĝuis biergustumadon en Biržai-kastelo, kun folklora prezento de litovaj kaj Esperantaj kantoj. Agrabla estis promeno inter originalaj flor-ornamaĵoj en bienpalaco de la urbeto Pakruojis. **Liba Gabalda**



Foto: Liba Gabalda

# Varia programo en „REVO“

Merkrede posttagmeze okazis en Panevėžys'a bazlernejo de surduloj kaj duonsurduloj, sidejo de la loka Esperanto-klubo "REVO", renkontiĝo kun varia programo: koncerto de la ensemblo "Pušelė" (Pineto); prezento de dresitaj hundoj, artaĵoj el lano, eduka arta kaj sporta programo, kantado, ludoj, dancado ĉe bivakfajro kun trinkado de teo kaj gustumado de lokaj dolĉaĵoj kaj estis plantita "Arbo de BET-55".





Fotoj: Gražvydas Jurgelevičiusa

# Muziko kaj movoj por sano

## Al la seminario de Pavla Dvořáková „Ĉu muziko povas kuraci?“ (legu en la BET-libro, p. 111) kontribuis ankaŭ muzikologino Antanina Jurgutyte.

Ĉiuj scias, ke moviĝi estas sane, ke manko de moviĝo estas kaŭzo de multaj malsanoj... Dum malnovaj tempoj, kiam en gentoj regis ŝamanoj, estis kutimo fortigi sanon de homoj kaj ilin kuraci per ritmaj dancoj kaj kantoj... Hipokrato konsilis al malsanuloj gimnastiki sub ludo de fluto... Klasika ekzemplo – itala rapidtempa kaj karaktera ritma danco tarantelo. Nomiĝo de tiu danco estiĝis de araneo tarantulo, kies mordo esta mortiga. Al mordinto de araneo estis ordonita tre arde danci, ke venenoj sukcesu rapide foriĝi kune kun ŝvito. Tiel dancante la homo resaniĝis. Galeno, kuracisto de Romo, vaste rekomendis muzikon kiel kontraŭvenenojn pri tiuj okazoj.

En komenco de la 20-a jarcento en Francio, Germanio kaj de la jaro 1926 en multaj landoj de Okcidenta Eŭropo kaj Ameriko estis fondita internacia asocio, kiu esploradis proponitan metodon de E. Jacques-Dalkroze (1865-1950, fama svisa pedagogo-komponisto), kiu estas bazita per sintezo de muzika ritmo kaj moviĝo. Por malsanuloj, kiuj malsanis pri neŭrosomataj malsanoj, precipe kiam evidentiĝis apatio, malkonfido al siaj fortoj, neorganizeco, en kuraca korpa egzercado taŭgas klarakcentaj ritmaj kreitaĵoj: 1) valso el baleto de L. Delibo „Kopelija“ sceno Nr.1; 2) valso el opero Ŝ. Guno „Faŭto“ la II-a ago; 3) rapsodio de E. Ŝabrije „Hispanio“; 4) „Bolero“ de M. Ravelo...

Terapeŭtoj de eksterlanda muziko A. Pontvik, H. M. Sutermeister, H. G. Jedike k.a. klarigas, ke libera improvizado de movoj helpas perfektiĝi ne nur per psikologia, sed ankaŭ per estetika senco. Muzika terapio, kiel metodo de moderna psikologio, estas uzata komplekse, kuracante malsanulojn en kuracloko (Druskininkai-Litovio). Muziko havas grandan gravecon al homa perfektiĝo, instigas pozitivajn emociojn, malgrandigas psikologian streĉon, forturnas pensojn de turmentanta malsano, instigas individualan bezonon moviĝi. Ĉio tio helpas batali kontraŭ malsanoj.



# Bonvenon al BET-56 apud Cēsis, Latvio!



La 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazos ekde la 4-a ĝis la 11-a de julio 2020 en Priekuļi – grandvilaĝo, administra centro de la samnoma municipo, situanta 7 kilometrojn orienten de Cēsis.

Cēsis – unu el la plej belaj urboj de Latvio – situas en la nordorienta parto de la lando, 87 km for de Rigo kaj estas facile atingebla kaj buse, kaj trajne.

Cēsis (Wenden) estas fondita en 1206 kaj estas la 3-a plej malnova urbo en Latvio, loĝantaro ~ 17 000. Ĝi situas apud rivero Gauja en la teritorio de Gauja Nacia parko, konata per sia pitoreska ĉirkaŭaĵo.



En Cēsis situas iam la plej potenca mezepoka kastelo de Livonio, konstruita en 1214 – nuntempe la plej impresa kaj plej bone konserviĝinta kastelruina ensemblo en Latvio. Kun kandelaj lanternoj eblas promeni tra la kastelo, rigardi urban panoramon de sur la turo kaj eĉ viziti mezepokan prizonon. En la Nova kastelo (konstruita fine de la 18-a j.c), kiu iam apartenis al grafoj Sievers, nun situas Muzeo pri Historio kaj Arto. La antikva parto de Cēsis estas fama pro la bone konservita reto de mezepokaj stratoj, arkitekte elstaraj historiaj domoj kaj la antikvaj bazarplacoj. Nepre menciinda estas ankaŭ la preĝejo de St. Johano – la dua plej signifa objekto de la mezepoka arkitekturo en Cēsis, konstruita en la 13-a jarcento.

Cēsis ĉiam altiris vojaĝantojn – per sia kulturhistoria heredaĵo, beleco de la naturo kaj kvieta ritmo de la malgranda urbo. Venu ankaŭ vi kaj ĝuu la romantikan atmosferon en Cēsis – parkojn, kastelojn, artajn galeriojn, multnombrajn kafejojn k.a.



BET-ejo de la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estos Teknika lernejo de Priekuļi, partoprenantoj de BET-56 loĝos en studenta hotelo de la lernejo, dezirantoj havi pli



da lukso povos loĝi en 3-stela hotelo "Tigra" en Priekuļi aŭ en hoteloj kaj gastejoj en Cēsis.

Pli detala informo (Informilo No 1) kaj Aliĝilo baldaŭ aperos en la hejmpaĝo de Latvia Esperanto-Asocio *http://www.esperanto.lv,* kiel kutime eblos aliĝi ankaŭ rete.

Programo de BET-56 enhavos diversnivelajn Esperanto-kursojn, enkondukan kurson en latvan lingvon, Someran Universitaton, Sanktan Meson en Esperanto, Interkonan, Nacian kaj Adiaŭan vesperojn, duontagajn kaj tuttagan ekskursojn, kvizojn, filmojn, kantojn, dancojn k. a. aranĝojn. Bonvenon al Latvio! Bonvenon al BET-56!

**Margarita Želve**
Prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio
*margarita.zelve@gmail.com*



## Atenton!!!

**Por ke la adiaŭa koncerto, okazonta vendrede 13.07.2019 estu interesa kaj sukcesa, ĉiuj dezirantoj partopreni estas petataj urĝe kontaktiĝi kun s-ro Mikaelo Lineckij, kiu kompilas la programon!!!**